

Hispana Esperanto GAZETO

1.^a Jaro APRIL 1931 N-ro. 1

ORGANO OFICIAL DE LA
ASOCIACIÓN ESPERANTISTA ESPAÑOLA
OFICIALA ORGANO DE
HISPANA ESPERANTO ASOCIO

Redakcio kaj Administracio :
SAGASTA, 10. - MADRID (HISPANUJO)

TIPOGRAFÍA CHULILLA Y ANGEL
Torrecilla del Leal, 17
Teléfono 71926

A NUESTROS H. E. A.-ANOS

Desde que en 1926 quedó legalmente constituida la ASOCIACIÓN ESPERANTISTA ESPAÑOLA, uno de los principales anhelos de su Junta Directiva fué el crear, con elementos propios de la Sociedad, una revista, dedicada al fomento de la unión y armonía entre sus miembros, a la difusión del ideal esperantista y a dar cuenta del resultado de todos sus trabajos sociales, en la forma prescrita en el artículo VI de los Estatutos.

Durante los cinco años transcurridos, primero «*La Suno Hispana*» y luego «*Hispana Esperanto*» laboraron a favor de nuestra Asociación, con un desinterés que nunca será bastante alabado, publicando cuantas noticias y trabajos se consideraron de importancia para la Sociedad y para sus miembros.

A ambas publicaciones debe la ASOCIACIÓN ESPERANTISTA ESPAÑOLA la más efusiva y sincera declaración pública de su agradecimiento, y no ha de escatimárselo aquí, en la primera ocasión que se le presenta, tan amplio como su constante altruismo ha merecido. Y lamenta, por otra parte, que circunstancias que no son para tratadas en este lugar obligaran a los directores de dichas revistas a dejar de publicarlas, perdiendo así el esperantismo español importantes y eficaces elementos de ilustración y propaganda.

Dentro de las escasas disponibilidades económicas con que la Asociación cuenta, su Junta Directiva, representada para este caso por el Comité de Redacción, tratará de que, en el número de páginas que sea posible, aparezca mensualmente HISPANA ESPERANTO-GAZETO, la cual será distribuida gratuitamente a todos los socios de H. E. A. y a quienes la soliciten, para efectos de propaganda; estableciendo canje, al propio tiempo, con todas las revistas samideanas de España y del extranjero, siempre que ninguna de ellas se aparte, directa ni indirectamente, de lo que debe ser mandamiento de obligatoria observancia para los amantes de la difusión de la lengua auxiliar internacional: ausencia de toda idea social, política o religiosa, condensadas en la máxima PACO KAJ AMO, tan recomendada por el nunca bastante llorado creador del Esperanto, a quien dedica un sentido recuerdo, y tiene el honor, al mismo tiempo, de saludar y ofrecerse a la *tutmonda samideanaro*.

LA REDACCION

SECCION DE PROPAGANDA

Los que bregamos ha ya muchos años por la propagación del Esperanto, advertimos un fenómeno digno de llamar la atención de todos, y es que, a pesar de las cualidades maravillosas del idioma internacional, no obstante la grandiosidad de la idea, y a despecho de las facilidades que ofrecemos al público todos los propagandistas, son relativamente pocas las personas que se deciden a estudiarlo.

¿Cuál es la causa determinante de este fenómeno?

Seguramente, queridos *samideanos*, habréis pensado más de una vez en ello, al cercioraros de que no ocurre lo que confiadamente creemos en los primeros tiempos de nuestro apostolado, cuando, con la fe del convencimiento, abrigamos la esperanza de ver convertido el mundo al esperantismo en brevísimo plazo, y luego la crudeza de los hechos nos vuelve a la realidad, viendo que pasan los años, demasiados años, sin que obtengamos el anhelado fruto.

Por mi parte, puedo deciros que he meditado largamente sobre tal fenómeno, y voy a exponeros la conclusión a que he llegado, creyendo que sería muy útil para nuestra causa que todos vosotros señalarais también vuestros puntos de vista sobre el obstáculo que se opone al rápido progreso de nuestro ideal. El conocimiento de tales opiniones nos llevaría quizá a enfocar la propaganda del modo más adecuado y eficaz para la consecución de aquél.

Yo creo que el público no se hace esperantista, sencillamente porque *no conoce lo que es el Esperanto*.

Ocurre con esto exactamente lo mismo que sucedía con el azúcar...—y no podrás decir, amado lector, que te amargo la existencia con esta singular comparación—. Cuando se trataba de introducir esta dulce mercancía en el comercio con algunos pueblos de Africa, se observaba que los indígenas no hacían aprecio alguno de ella, mirándola con desconfianza; pero, en cuanto la *probaban y conocían* sus excelentes cualidades, ya no podían pasar sin ella y los pedidos llovían que era un prodigio.

¿No será esta misma la causa de que el Esperanto sea mirado con indiferencia, y a veces hasta con desconfianza, por la inmensa mayoría de los mortales? Porque no se concibe que, quien conozca una cosa y sepa que es, no sólo buena, sino magnífica, cuya posesión cuesta muy poco tiempo y casi ningún dinero y la cual ha de reportar un inmenso beneficio a la humanidad y a su progreso, sea indiferente a su propagación y hasta contrario a su establecimiento, como hemos tenido lugar de ver repetidas veces, sobre todo entre las crónicas

rápidas de los diarios, que por fuerza han de tratarlo todo muy superficialmente.

Esto no puede obedecer más que a un completo desconocimiento del asunto, y por eso es preciso, a mi juicio, emprender una campaña de propaganda, de amplia difusión, de minuciosa descripción de las cualidades y alcance social de la implantación del idioma internacional, haciendo llegar este conocimiento del Esperanto a todos los sectores de la actividad mundial, empleando los medios adecuados a cada uno de ellos, no olvidando que a un catedrático (especialmente si lo es de idiomas) hay que presentarle el asunto de muy distinto modo que a un industrial o comerciante, a un obrero, etc.

Y téngase también en cuenta que, para atraer un adepto a nuestro campo, no basta decirle que existe el Esperanto, y dejarlo ya en paz; hay que insistir prudentemente, hay que poner al alcance de su intelecto la demostración de la excelencia de nuestra causa; hay que hacerle probar el azúcar, y, seguramente, cuando conozca sus inmejorables propiedades, tendremos un esperantista más.

Esto mismo le ocurrió al que suscribe, y sé que lo propio sucedió a gran número de correligionarios. Durante el verano de 1905 pasó unos días en el pueblo donde yo residía—una industriosa villa de la provincia de Valencia—el entusiasta esperantista D. Ramón Ayza, teniente coronel de Estado Mayor, y, al serme presentado, no tardó en hablarme del Esperanto, de sus cualidades y de su difusión por todo el mundo. Desde luego, por cortesía, le oí con atención y hasta llegué a comprender el alcance que su implantación tendría en todos los órdenes del progreso; pero sin llegar a convencerme respecto a su facilidad y posibilidad de establecerlo. Otro día insistió y me entregó una hojita de propaganda, rogándome que la estudiara en casa despacio. Efectivamente, así lo hice, y en aquel rato de meditación quedé encantado de la maravillosa sencillez del idioma y de la grandiosa concepción de la idea esperantista.

Una simple hojita de propaganda, muy bien escrita, por cierto, en la que se resumía y condensaba la materia gramatical y el contenido sociológico del Esperanto, realizó el milagro; al momento encargué libros, y a los ocho días pude ya escribir extensas cartas en el idioma internacional al autor de éstos, el entonces capitán Inglada Ors, y a mi conquistador, señor Ayza.

Venga, pues, propaganda. Edite nuestra *Hispana Esperanto Asocio* varias clases de hojitas bien meditadas y dirigidas, por lo menos, una a los intelectuales, otra a los comerciantes y otra a los obreros, con el fin que antes hemos apuntado, y distribúyanse profusamente.

Y por ahora, aprovechando la feliz circunstancia, ya tanto tiempo

anhelada, de poseer órgano propio nuestra Asociación, me propongo escribir aquí una serie de artículos sobre este asunto, más bien dirigidos al público no esperantista que a éste, a quien ruego les busque gran número de lectores.

F. SOLER VALLS

Cáceres,

* * *

NIA IX.^a HISPANA ESPERANTA KONGRESO

En la urbo Zaragoza okazos la naŭa Kongreso de H. E. A. ; en tiu Kongreso devos konveni kiel eble multe da samideanoj, tial ke ĝi estos sendube renaskiĝo, aŭ pli bone replifortiĝo de H. E. A. ; ĉar estas neduvebla vero ke Esperanto ĝis nun, escepte en malmultaj okazoj, preskaŭ ĉie, dormis, kaj dormas, kaj ni estas tiuj, kiuj devas vekigi la neinteresulojn, kaj nesciulojn, ĉar estas ĝenerala opinio ke, se ni ne kuniĝas en forta kaj harmonia asocio, ni neniam atingos nian belan celon. Kiu estas, do, la kaŭzo de tiu neharmonio? Ni tion scias, kaj ni kuraĝe devas ataki la barojn. Kiu utilas, do, ke du aŭ tri dekoj el bonaj homoj, veraj amantoj de nia celo intencos pligrandigi la esperantan kampon, se dume inter ni, inter la vicoj de la veraj amantoj eniras la detruantaj venenigantaj mikroboj?

En la IX.^a nacia Kongreso, ni diskutos la novan regularon, kiu devos regi la H. E. A.-n, aŭ la novan naskigotan nacian organismon ; en tiu Kongreso, kiel pacaj batalantoj, ni ĉiuj kuniĝos por defendi Esperanton kaj altrudi ĝin en nia lando.

En la gastameca Zaragoza, kaj precipe en la grupo «Zaragoza Esperantista», nur la ideo de la efektivigo de la Kongreso kaŭzis tre bonajn kaj ĝojajn iluziojn, tial ke la kongresoj nuntempaj signifas verajn pruvojn ke Esperanto estas giganta forto, kiu en estontaj tempoj ludos interesan rolon en la internacia vivo.

JOSÉ CARNICER

* * *

«He tenido ocasión de asistir a una reunión internacional de esperantistas. Allí había hombres de todos los países, reunidos en el mismo salón, y, por el mismo ideal, entenderse recíprocamente. Y, efectivamente, consiguieron esa intercomprensión moral y lingüística todos, como hermanos de una misma familia. Viví, lo recuerdo, oyéndolos, una hora de grande y humana emoción; y comprendí en tal momento que el Esperanto marchará camino adelante por todo el mundo, como el sistema métrico, y que los servicios prácticos que ha de rendir serán dignos de consideración desde todos los puntos de vista en la vida del comercio.»

(EMILE SCHREIBER, director de *Les Echos*).

* * *

WIEN-AJ FOIROJ 1931

La templimoj por Wien-aj Foiroj, 1931, kiuj kiel kutime okazas tuj post Leipzigaj Foiroj, estis fiksataj por la printempa (jubilea) de la 8. - 115. de marto kaj por la aŭtuna de la 6. - 113. de septembro.

LITERATURA ALVOKO

La troa afableco de miaj kolegoj—pli ol miaj meritoj kaj mia kapableco—metis min por la gvidado de tiu literatura sekcio de nia HISPANA ESPERANTO-GAZETO. Tial mi profitas la okazon por saluti la tutan esperantistaron kaj postuli el ili bonvolecon kaj helpon.

Kiam komencas la kurso, la profesoroj kutimas alparoli la lernantojn pri la graveco de sia lernobjekto «la plej grava en la kariero». La gestudentoj auskultas pacience, sed mokeme; ĉar same «plej grava en la kariero» estas—laŭ la koncernaj profesoroj—la ceteraj lernobjektoj. Se mi ilin imitus, mi povus paroli al vi pro graveco de Literatura en nia movado; pri Poezio, patrino de gramatiko, plej firma kolono de lingvoj. Mi pruvus mian aserton per facile brila disertacio, en kiu mi parolus pri antikvaj popoloj, pri Himno al Nilo, pri pragrekoj, ĝis pri la nun renaskantaj nacioj. Sed, se por mi, Literatura estas tiel grava, tamen mi ne intancas konvinki la ne Literaturemulojn. Mi konfesas, ke en la nuna vivo, la kolonoj de Esperanto estas pluraj,

nome: Literaturo, komerco, radio, diplomato, turismo, interŝanĝado...
Mi preferas, laŭ la Nelsona parolo, al vi diri: «*Esperanto esperas*
ke ĉiu homo plenumos sian devon.»

Sed—botisto al viaj botoj—mi revenas al mia afero, kaj kore
invitas ĉiujn geesperantistojn, ĉu junajn, ĉu novajn, ĉu malnovajn, kiuj
sentas en si la dian fajron de la inspiro, sendi al tiu ĉi GAZETO iliajn
verkaĵojn. En speciala sekcio «Memvola kunlaboro» mi respondos aku-
rate pri la verkoj.

Ne timu tie trovi severan tribunalon. Hispana klasikulo en famega
dramo diras: «Juez que ha sido delincuente ¡qué fácilmente per-
dona! = Juĝist' estinte krimulo. Kiel facile pardonas!»

Kaj en nia provebaro, arĥivo de popola scienco, oni trovas unu,
kiu plej trafe esprimas saman senton: «El que fué cocinero antes que
fraile, lo que pasa en la cocina muy bien lo sabe.» = Kiu estis kuiristo
antaŭ ol esti monaĥo tion, kio okazas en kuirejo, tre bone konas.

Por la bono kaj progreso de Esperanto, atendas vian afablan
helpon.

AMALIA NUÑEZ DUBUS

* * *

LA ETERNA RIMO

Ne diru ke, finita la trezoro,
mankanta temojn, ja mutiĝis liro,
se poetoj ne estus, tamen ĉiam
ezistos poezio!

Dum la ondetoj pro la kiso luma
tremu pro ekbruligo;
dum la ĉifonaj nuboj la sun' vestu
per fajro kaj per brilo;
dum kunportu l' aer' en sia brusto
parfumojn, harmoniojn;
dum estos en la mond' bela printempo
ekzistos poezio!
Dum la scienco ne solvos la problemon
pri l' fontoj de la vivo;
dum estos en la mar' aŭ en l' aero

nekonataj abismoj ;
 dum la homar' nescios kien marŝas
 kvankam antaŭeniros ;
 dum ekzistos mistero por la homo
 ja estos poezio !

Dum gajas la animo, sed ne estas
 rido de niaj lipoj ;
 dum ni ploras, kaj, tamen, ni ne havas
 larmojn sur la pupiloj ;
 dum la cerbo kaj la kor' batalos
 unu kontraŭ la alio
 dum estos rememoroj kaj esperoj
 ekzistos poezio !

Dum okulojn okuloj rereflektos
 kun amo kaj revigo ;
 dum respondos al lipoj sopirantaj
 la lipoj per sopiro ;
 dum miksitaj ja povas sin sentiĝi
 du animoj per kiso ;
 dum ia bela junvirin' ekzistos
 ekzistos poezio !

GUSTAVO ADOLFO BECQUER

(El hispana lingvo tradukis *Fernando Redondo*).

* * *

GRAMATIKAJ OJ

I

En Hispanujo oni jam publikigis pli ol kvardek gramatikojn por la instruado kaj lernado de la bela internacia lingvo Esperanto, tial per iu ajn oni povas lerni kaj instrui la Zamenhofan lingvon ; sed en tre malmultaj lernolibroj oni instruas ioj pri la lernado de la sintakso, precipe pri propozicioj aŭ esprimmanieroj de niaj pensoj, tial mi intensas speciale trakti pri la sintakso, kvankam mi ion diros ankaŭ pri la parolpartoj.

La parolpartoj estas dek ; nome : artikolo, nomo, adjektivo, pronomo, verbo, participo, adverbo, prepozicio, konjunkcio kaj interjekcio.

Artikolo estas parolparto uzata antaŭ la nomo por ĝin determini, aŭ limigi ĝian amplekson: ekz.: La rozo estas floro; la pirarbo produktas pirojn; la suno brilas.

Nomo estas parolparto esprimanta personon, beston, lokon aŭ aĵon: ekz.: Petro, leono, Madrido, krajono.

Adjektivo estas parolparto kvalifikanta aŭ determinanta nomon, pronomon aŭ aron da vortoj anstataŭantaj nomon: ekz.: La tigro estas kruela; vi farigis sensenta; tiu, kiu diras la paroladon (la parolanto), estas elokventa.

Pronomo estas parolparto anstataŭanta nomon por eviti ĝian ripetadon: ekz.: Johano venis kun mia kuzino, sed ŝi ne parolis; la lernantino diris al la profesoro, ke li klarigu la propozicion.

Verbo estas parolparto esprimanta ekziston, staton, aŭ agon de la estaĵoj, aŭ ricevanta la efikon de ilia ago: ekz.: La mondo ekzistas; mis amiko havas grandajn bienojn; la suno fruktigas la arbojn; la studento estas premiita de sia profesoro. La verbo ludas la ĉefan rolon en la propozicio.

Participo estas parolparto havanta adjektivan formon kaj partoprenanta la ecojn de la verbo kaj de la adjektivo: ekz.: Lernanto kopianta lecionaron; libro verkita de saĝulo.

Adverbo estas parolparto kvalifikanta aŭ determinanta verbon, adverbos, adjektivon, aŭ particon: ekz.: La knabo premiita parolas korekte; la muzikisto kantis tre laŭte; la vesto estas sufiĉe longa; la laste menciita infano estas blinda.

Prepozicio estas parolparto uzata por kunigi du vortojn, per difinita relato: ekz.: Flugilo de vulturo; mielo kun kuklo.

Konjunkcio estas parolparto uzata por ligi vortojn, propoziciojn, aŭ frazojn: ekz.: La patro kaj la filo; la patrino vokis la infaninon, sed ŝi forkuris; la plumo troviĝis nek sur la tablo, nek inter la paperoj.

Interjekcio estas parolparto esprimanta subitan ekmovon de la animo: ekz.: For!, fi!

Sintakso estas parto de la gramatiko pritraktanta la konstruon de la propozicioj, kaj la reciprokajn rilatojn de la parolpartoj en la diversaj propozicioj. Ĝi estas dividata en *rekta* aŭ *regula*, kaj *nerekta* aŭ *inversa*.

Propozicio estas vorto aŭ aro da vortoj per kiuj oni esprimas penson: ekz.: Kantu; leono estas besto; la tago estas hela; la suno brilas. La esencaj partoj de la propozicio estas du: nome, *Subjekto* kaj *Predikato*.

(Daurigota).

CHARLES RICHEL Y EL ESPERANTO

Charles Richet, miembro del Instituto francés de la Academia de Ciencias de Francia y Profesor de la Universidad de París, destacada personalidad en la vanguardia de la cultura internacional, acaba de publicar una obra, titulada «*La Edad de Oro y la Edad del Oro*», en la que pinta magistralmente a la sociedad actual dominada por la extraordinariamente avasalladora ambición de oro, que hace a este metal, o a lo que significa, el dueño del mundo, y expone las reformas que cree debieran acometerse para llegar pronto a unos tiempos más felices. Hay en la obra un capítulo dedicado al Esperanto, del cual son los párrafos siguientes:

«Cuando uno habla de la lengua internacional, universal y única, *Esperanto*, las personas serias «se retuercen»—yo uso la moderna jeringoza, que está de moda poner en ridículo por aquellos que no saben más que burlarse de las cosas sin conocerlas—, y se recibe de ellas una concluyente y extraordinaria opinión: —¡Oh! ¡Oh, el *Esperanto*!

A esto se reduce toda la fuerte y convincente argumentación de tales personas. En vano se les dice que es una lengua sencilla, flexible, fácil de aprender y aún más fácil de comprender. —¡Oh! ¡Oh, el *Esperanto*!

Lengua que todas las personas cultas o no cultas de Europa pueden comprender, leer y escribir después de tres meses de estudio. —¡Oh! ¡Oh, el *Esperanto*! Y no saben otra cosa que responder.

Si, por azar de una loca casualidad improbable, mucho más quimérica que todo cuanto digo en este libro, yo llegase a ser ministro de Instrucción Pública, uno de mis primeros pasos sería dirigirme a todos mis colegas de los distintos países, ministros como yo, en Italia, Inglaterra, Bélgica, España, Alemania, etc., proponiendo la organización obligatoria de un curso trimestral de Esperanto, solamente trimestral, para jóvenes de ambos sexos de 16 años, y que, al fin de los tres meses, una comisión internacional viajase por Europa, distribuyendo valiosos premios a los profesores y alumnos que hubiesen alcanzado éxito en la enseñanza y en el aprendizaje.

Se establecería entre los jóvenes alumnos de todos los países un cambio de correspondencia cordial y activa. Igualmente, reuniones y asambleas, donde el espíritu internacional, gracias a la unidad de la lengua, encontrase su más noble desenvolvimiento. Todo esto no es muy complicado. Necesitaría sólo pedir de los jóvenes muy pequeño esfuerzo: una hora diaria durante tres meses; pero no pedir, sino exigir, como se hace con el latín o la matemática. Eso significaría

posibilitar la conversación, sin dificultad alguna, con todos los habitantes de Europa, ya búlgaros, ya finlandeses, etc.

Nunca será ministro de Instrucción Pública; pero ¿por qué un joven e inteligente ministro, sin tener en cuenta la observación «¡Oh! ¡Oh, el Esperanto!», no se decide a tomar sobre sí mi proposición, tan fácil? Estoy seguro de que encontraría un fuerte apoyo en muchos países de Europa.»

* * *

H. E. A., atenta siempre a aprovechar toda ocasión que se presente para insistir en sus constantes demandas cerca del Poder público, con el fin de que se implante la enseñanza obligatoria del Esperanto en los establecimientos oficiales de instrucción, ha dirigido al excelentísimo señor Ministro de Instrucción Pública la siguiente instancia, basada en las palabras de M. Charles Richet:

«S-ro. Jozefo Perogordo, Artileria Kolonelo, provizora Prezidanto de la Hispana Esperanto-Asocio, sidanta ĉe la loĝejo de la Supera Konsilantaro de la Ruĝa Kruco, Sagasta, 10, kiu prezentas sian laŭklasan personateston, liveritan en tiu ĉi Ĉefurbo, antaŭ via Moŝto eldiras:

Ke ĉar la Konsilantaro de la Ministerio de Publika Instruado, tiel inde regata de vi, prijuĝis la 23-an julio 1930-a, la peton de la dirita Asocio per ke oni donu al Esperanto samajn rajtojn ol al la aliaj modernaj idiomoj, kaj ke oni permesu ĝin enmeti en la Universitatan abiturientan planon, kaj ĉar en tiu prijuĝo estas dirite ke oni akceptas la meriton de tiu ĉi lingvo kaj la utilon, kiu povas alveni al tiu kiu lernis ĝin, kio estas facila, kaj oni konsideras ke, pro la dirita utileco, konvenas ke la Stato helpu la esperantistan organizadon por progresigi la disvastigon de tiu ĉi lingvo kaj faciligi ĝian instruadon ĉe la lernejoj celantaj la konkretan preparadon por tuja aplikado; kaj ĉar al tiuj ĉi laste diritaj edukejoj apartenas la Komercaj Lernejoj.

Li petas al via Moŝto la oficialan enkondukon de Esperanto en tiajn Lernejojn, ĉiam kiam la esperantista organizaĵo alportu senpage la Profesorojn dum la eksperimenta periodo de la dirita instruado.

La HISPANA ESPERANTO-ASOCIO proponos tiujn Profesorojn ĉe multenombraj urboj, kaj ili estas provizitaj de la koncerna kapableca Diploma, liverita de la HISPANA ESPERANTO-INSTITUTO. Kaj se via Ministra Moŝto decidus favore, ĝi povus, kun granda honoro por

Hispanujo rilate al la naciaj interkonsentoj, preni sur sin la iniciaton de la eminenta Membro de la Franca Instituto, de la Scienca Akademio de Francujo kaj Profesoro de la Universitato de Paris, S-ro. Charles Richet, kiu, en sia nova verko titolita «La Ora Aĝo kaj la Aĝo de la Ormetalo», diras :

«Se, okaze de neesperebla petolema hazardo, multe pli fantazia ol ĉio, kion mi diras en tiu ĉi libro, mi atingus la honoron esti Ministro de Publika Instruado, unu el miaj unuaj paŝoj estus min turni al ĉiuj miaj kolegoj, ĉe la diversaj nacioj, ministroj kiel mi, en Italujo, Anglujo, Belgujo, Hispanujo, Germanujo, k. c., proponante la devigan organizadon de trimonata kurso de Esperanto, nur trimonata, por 16-aĝaj junuloj ambaŭseksaj, kaj je la fino de la tri monatoj, Internacia Komitato travojaĝu Eŭropon, disdonante valorajn premiojn al la profesoroj kaj lernantoj, kiuj estus sukcesintaj en sia instruado aŭ lernado.

»Oni estarigus inter la junaj lernantoj de ĉiuj landoj koran kaj aktivan korespondadon. Same estus pri kunvenoj kaj kongresoj, kie la internacia spirito, dank' al la unueco de la lingvo, trovas sian plej noblan disvolviĝon. Ĉio tio ĉi ne estas tre komplikita. Ĝi nur bezonus peti de la junuloj tre malgrandan klopodon: unu horon en ĉiu tago dum tri monatoj; kaj ne peti, sed postuli, kiel okazas pri latinlingvo aŭ matematiko. Tio signifus ebligi la interparoladon sen ia malfacilaĵo inter ĉiuj Eŭropaj loĝantoj, ĉu bulgaroj, ĉu finlandanoj, k. c.

»Mi neniam estos Ministro de Publika Instruado; sed kial juna kaj inteligenta ministro, ne atentante pri la antaŭjuĝo «Ho! Esperanto!», ne sin decidas preni sur sin mian tiel facilan proponon? Mi estas certa pri tio ke li trovus fortan helpon ĉe multaj landoj de Eŭropo.»

Si tiu ĉi iniciato, Ministra Moŝto, estus efektivigita de vi, ne nur la universala esperantista movado (pri kiu oni povas konscii, same kiel pri la lingvo, per la ĉi-kuna broŝuro «Kio estas Esperanto?») aliĝus al via ago, sed la bonfamo de Hispanujo pligrandiĝus en la tuta mondo, pro kio nia lando atingus veran gloron, kaj la nomo de via Moŝto restos en la Historio kiel unu el la plej grandaj bonfarantoj por la paco kaj homa progreso.

Tion esperas de via Moŝto, kies vivon Dio gardu multjare por la bono de nia patrujo.

Madrido, la 19-an de marto 1931-a.

José PEROGORDO.»

CRONICA EXTERIOR

«Internacia Esperanto-Muzeo de Wien», en sia nova hejmo je dispono de la tutmonda esperantistaro! En Wien, I., Neue Burg, Heldenplatz (jen la adreso):

La ŝtato Aŭstrio kun kostoj de sv. fr. 9.000'— instalis por eternaj tempoj (laŭ kontrakto kun Ministerio por Instruaferoj) belan, indan hejmon, por kiu la tutan elegantan meblaron la administracio de Hofburg (iama imperiestra kastelo!).

la 11. de aŭgusto 1929 okazis la inaŭguro de IEMW flanke de la protektoro, Prezidanto de la Respubliko Aŭstrio, s-ro. Wilhelm Miklas. La Prezidanto en ĉesto de kanceliero Streeruwitz akceptis la reprezentantojn el la diversaj landoj! Unika okazintaĵo, okazinta la unuan fojon en la E.-movado, ke ŝtatefo akceptas la esperantistaron!

Altranguloj el la diversaj medioj kaj landoj estas en la Internacia Honora Komitato de nia IEMW.

Pli ol 3000 libroj, broŝuroj ktp., pli ol 100 diversaj gazetoj estas en la legejo je dispono de la esperantistoj! IEMW estas aligita al fama Nacia Biblioteko kaj tio garantias, ke nenio perdiĝos!

Ĉiu *samideano*, ĉiuj grupo, societo, ligo ktp. estu membro de IEMW kaj per tio helpu, ke IEMW havu ĉiam la kapitalon necesan por korekta funkciado.

Nur du kategoriojn de membroj havas IEMW:

- a) *Dumviva* por la samideanoj,
- b) *Deĵara* por grupoj, societoj, ligoj, ktp.

Ĉiu pagos *unufoje*, aŭ, S 15.— (sv. fr. 11.—).

a) por ĉiam, b) por *dek jaroj* kaj rekompense ricevos:

1. *membrokarton*.
2. la numeron de Aŭstria Esperantisto, en kiu estos anoncata sia aliĝo
3. 2—3 *fotografiaĵojn* pri la ekstero kaj interno de IEMW.
4. *ĉiujare* la oficiale en Aŭstrio aperontajn gvidfoliojn (ĉijare ankoraŭ du).
5. en 1931 *Adresaron* pri la Honora kaj Kuratora Komitatoj, pri ĉiuj membroj, grupoj, asocioj ktp., kiuj aliĝis.
6. en la sekvontaj jaroj *Aldonon al Adresaro* kun la novaliĝintoj kaj adresŝanĝoj.

Ĉiu *E.-gazeto* kaj *eldonejo*, kiuj regule sendas siajn eldonaĵojn, estos menciataj.

Do ne hezitu, ne prokrastu vian aliĝon kaj varbu ankaŭ aliajn!

Kiu krome sendos materialon kian ajn por IEMW, ricevos oficialan

dankleteron flanke de Nationalbibliothek en Wien kun kvitanco pri la donacita materialo !

Por ke *ne manku* en la legejo iu E.-gazeto, la gazet-eldonejoj afable sendu regule siajn gazetojn.

Por ke almenaŭ en unu loko de la mondo estu ĉiu E.-*verko* legebla kaj havebla, la eldonejoj afable sendu la ĝis nun aperintajn verkojn kaj regule la aperontajn ! Kelkaj jam agas tiel ! Ni publikigos iliajn nomojn en la gazetaro kaj en nia adresaro !

Informu pri ĉi tiu grava afero viajn korespondantojn, invitu ilin al aniĝo kaj sendado de materialo. Sendu afable al ni iliajn adresojn !

Por «Internacia Esperanto-Muzeo en Wien»

Registara konsilanto Hugo Steiner,

Prezidanto kaj fondinto.

* * *

R E C E N Z E J O

«*Esperdona Islando*», de Jak. de Vreese, S. J., esperantigita de Fratulo Floriano. 12 × 18 cm., 40 paĝoj, 11 ilustraĵoj, belega kovrilo, luksa papero, rimarkinda preso. Prezo aŭfrankite : fr. fr. 5. Havebla ĉe «*Espero Katolika*», 22, cours Albert 1er. - Paris VIII. La libreto diras pri la nuna stato de katolikoj en la preskaŭ absolute protestanta loĝantaro kiu komence estis tute katolika ; la teksto enhavas interesajn notojn pri la islandano kaj la lando. Korekta stilo. En ĝi aperas uzo de «*ekde*», kiun recenzisto ne ŝatas, kaj vorto «*residejo*» tute hispana.

* * *

«*Poemo de l'Plugisto*», de H. M. FRIMA, n-ro. 11.^a de la Biblioteko de Sennaciulo. 12 × 15 cm., 28 paĝoj. Prezo : 0,60 mhg. Havebla ĉe Sennacieca Asocio Tutmonda, 23, rue Boyer, Paris XX. Enhavas la libreto 28 poemojn, el kiuj estas belegaj «*Nia Vilaĝo*», «*Mi*» kaj «*Knabo kaj Knabino*» ; per iom pli da atentemo la aŭtoro estus evitinta asonancojn kiuj difektas la ĝeneralan belrimon.

* * *

«*Per balono al la Poluso*», de la tutmond fama glora S. A. Andrée kaj liaj heroe kuraĝaj kunuloj Nils Strindberg kaj Knut Fraenkel, grandformata libro el 412 paĝoj, kun 115 ilustraĵoj, el kiuj dek faris Andrée mem post la falo de la balono (subskribitaj per Foto La Polusekspedicio de Andrée en 1897) ; luksa papero dika kaj brila ; eldonita de Eldona Societo Esperanto-Stockholm I - Svedujo. Prezoj :

broŝurita, 9 svd. kronojn, 10 germ. markojn, 10 ang. ŝilingojn; bindita, 11'50 cvd. kronojn, ĉiam 0'50 kr. por afranko.

La verkon esperantigis el sveda lingvo S-ro Stellan Engholm, tre sperta tradukisto kaj aŭtoro de la tre laŭdata verko «AL TORENTO», kiun li verkis originale. Krome, S-ro Paul Nylen, Akademiano kaj Lingvokomitatano, kontrolis la tradukon, kaj li kun la sperta samideano S-ro B. Gerdman legis kaj korektis la presprovojn. En tute, granda garantio por la verko!

Rimarkinde estas, ke S-ro Rektoro Sam Jansson sukcesis havigi la necesan monon por la eldono; ke S-ro Ernfrid Malmgren arde nelacigeble helpadis, kaj ke la esperantista presisto S-ro Bernhard Erikson rapide kaj lerte dum nokte kompostadis, kaj tiel dum unu monato la libro estis preta iri al la publiko, samtempe kiam aperis en lingvoj aliaj (hispana, sveda, angla, dana, ĉeĥa, franca, hungara, fiuna, holanda, germana, pola, itala kaj norvega).

Tute same rimarkinde estas, ke la plakoj prezentas unikan altvaloron en la mondhistorio, ĉar ili kuŝadis dum 33 jaroj en la glacio de la Poluso, kaj nur dank' al scienca laboro, zorge delikate farita, de fototeknikisto aŭ fotosciencisto, ili povis esti rivelataj.

La verko enhavas la ĵus trovitajn taglibrojn, notojn, fotojn, desegnojn, skizojn, k. c., de la heroaj veturintoj al la Norda Poluso per la balono «Aglø» je 1897. Eksterordinare huraĝa ekspedicio! La leganto, per la libro, de miro en miron, ĉiufoje kun plej avida intereso, plenemocie, konatiĝas kun la tragika aventuro, eĉ kvazaŭ sin sentante protagonisto, ĉar la herooj sincere plenreale koncize notadis ĉion eĉ ĝis ili sin trovis ĉe la sojlo de l'mortmondo; kaj ĉar la tradukinto, tirite sendube de tiel granda realeco, trafis transdoni al la esperanta traduko la saman realecon per bela, simpla, vulgara lingvo, en kiu, por plej granda realeco de la traduko, aperas neologismoj, kiuj eĉ donas allogon al la verko. Ĉi tiu vere de la stila vidpunkto estas altvalora juvelo de nia nuna esperanto. MENDU ĜIN TUJ!

NOTICIAS

Ha ingresado como Caballero en la Insigne Orden del Toisón de Oro nuestro ilustre Presidente honorario Excmo. Sr. D. Carlos María Cortezo, a quien efusivamente felicitamos, en nombre propio y en el de todos los esperantistas españoles, cuyos sentimientos de adhesión y

simpatía hacia el Excmo. Sr. Presidente del Consejo de Estado compartirán con nosotros.

* * *

El Excmo. Sr. D. José Perogordo y Camacho, nuestro muy querido Vicepresidente en funciones de Presidente, ha sido elevado al empleo de general de Artillería. Dámosle nuestra más cordial felicitación, deseándole en su alta categoría tantos lauros como ha merecido en todos los empleos de su carrera.

AVISOS IMPORTANTES

1.º El Comité de Redacción de H. E.-G. examinará cuantos trabajos, firmados, le sean enviados por los H. E. A.-ANOS, y publicará aquellos que, a su juicio, puedan contribuir de algún modo a la consecución del ideal esperantista; no aceptará discusiones ni controversias con los autores, y a disposición de éstos quedarán en el domicilio social los originales de los artículos que no se publiquen.

2.ª De la esperante skribitaj verkoj kies aŭtoroj sendos du ekzemplerojn al la Direktoro de H. E.-G., oni publikigos mallongan resumon, kiam la Redakcia Komitato konsideros ke tiaj verkoj ne traktas pri «aferoj speciale politikaj, kiuj apartenas al la diplomatoj, aŭ pri aferoj speciale religiaj, kiuj apartenas al la ekleziuloj kaj filozofoj», kiel la Majstro diris en la Kongreso de Cambridge.

3.º Aunque, como se expresa en el artículo que encabeza este primer número de H. E.-G., esta revista se repartirá gratuitamente, H. E. A. aceptará, agradecida, los donativos que se le hagan con el exclusivo objeto de contribuir al fomento de nuestro casi no nacido y ya muy querido órgano de difusión y propaganda.

4.º Este primer número será remitido desde luego a todos los H. E. A.-ANOS que hayan abonado la cotización de dos pesetas, correspondiente al año de 1930, encareciéndose a los que no la hayan satisfecho todavía la pronta remesa de la cuota de 1931.

5.ª Oni petas interŝanĝo al la esperantistaj gazetoj po duobla specimeno nepre. Adrezo pri la interŝanĝo: S-ro Mariano Mojado, Sekretario de HISP. ESP. ASOCIO, Abascal, 113, Madrid (Hispanujo).

